



PACO



OFICIALA ORGANO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO

VII-a jaro. N-ro 85

Ĉeĥoslovaka eldono

Decembro 1960

DEK JAROJ DE LA ĈEĤOSLOVAKA LEĜO

PRI DEFENDO DE PACO

Episkopo D-ro Miroslav N o v á k,
prezidantaro de la Ĉeĥoslovaka Komitato
de pacdefendantoj.

„Kiu provos atenci la pacan kunvivadon de la popoloj per kio ajn instigado al milito per propagando de milito aŭ alia subteno de militpropagando, kulpiĝas pri puninda faro kontraŭ la paco“ (§ 1 de la leĝo pri defendo de paco).

Vere — jam dek jaroj pasis depost valideco de la leĝo pri defendo de paco en Ĉeĥoslovakio. Estas utile, ĉiokaze ekmediti pri ĝi kaj rememorigi cirkonstancojn en la tempo de ĝia proklamo.

Antaŭiris monatoj de necerteco kaj timo, kiam malgranda, sed potenca grupo de armilproduktantoj, posedantoj de ĵurnaloj kaj radio-stacioj, oro kaj marbazoj, sukcesis imputi al granda parto de la mondo penson, ke **la tria mond-milito estas neevitebla**. Oni skribis kaj parolis pri tio, kiam kaj kie la milito ekflamiĝos. Eĉ en nia lando ŝajnis al iuj, ke post nelonge denove ekbruos bombatakantaj aviadiloj super niaj kapoj, kaj ke tuta bela kaj riĉa nia kulturo, rezultoj de nia laboro, neniĝos en ruinoj de urboj kaj vilaĝoj.

Kiel serena radio trapenetas nigrajn nubojn, tiel simile eksonis meze de milita histerio voĉo de nova espero, ke estas eble forigi katastrofon de milito, kaj ke tio sukcesos, se ĉiuj bonvolaj homoj el la tuta mondo etendos la manojn al si kaj defendos la pacon. Estis vere nova espero, kaj la popolo en fabrikoj ĉe maŝinoj kaj ekstere sur kamparo kune kun sciencistoj kaj verkistoj, kune kun gestudentoj kaj profesoroj kaj kun junularo el internulejoj, ĉiuj eksentis, ke en unueco kaj konkordo ili estas fortaj.

Kiel malgrandaj fontetoj unuiĝas en riveretojn kaj riveretoj en riverojn, same tiel el malgrandaj fontetoj naskiĝis en la tempo de danĝero movado de pacdefendantoj. Per la unua mondkongreso de pacdefendantoj nia ĉefurbo Prago samtempe kun Parizo iĝis naskloko de movado por paco, ĝojo, por vivo mem, movado, kiu nek havas nek havis ion egalan en la historio de homaro.

La pacmovado ne disponis pri mono, por dediĉi milionojn da dolaroj por sia propagando, simile kiel faras tion tiuj, kiuj elpensis kaj favoras tiel nomatan malvarman militon, sed ĝi estas forta per sia vero, kaj ĝia vero estas vero de centmilionoj. Partianoj de la malvarma milito, malamikoj de la paco komence mokis, ke pacdefendantoj volis per vortoj batali kontraŭ tankoj kaj atombomboj. Sed kiam montriĝis, ke vortoj, kiuj ekflamigas penson kaj volon de centmilionoj al decidemo kaj kuraĝa sintenado, estas pli fortaj ol militarmilaro, kaj depost kiam pli ol duono de miliardo da homoj

subskribis la unuan Stokholman alvokon por malpermeso de atombombo, oni komencis kalumnian kampanojn, ke pacdefendantoj estas „ruĝaj agitistoj“.

Estas utile, rememori tion, ĉar la ĉeĥoslovaka leĝo pri defendo de paco estas en kontinueco kun ĉio-ĉi. En ĝia antaŭparolo estas dirite: „La ĉeĥoslovaka popolo forte staros en tendaro de paco, decidita defendi la mondan pacon, endanĝerigatan per instigantoj de nova milito. Kun entuziasmo ĝi akceptis alvokon de la dua tutmonda kongreso de pacdefendantoj kiel esprimon de persista decido de ĉiuj honestaj homoj en la mondo, defendi la pacon kaj malebligi la militon. Ĝi esprimis jam en siaj novaj, popoldemokratiaj leĝoj sian volon, defendi la pacan kunvivadon de popoloj kaj puni ĉiujn, kiuj la pacon endanĝerigas.“

Nia leĝo pri defendo de paco estas parto de morala senarmigado, pri kio estis parolata en la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj jam en la jaro 1957. En Ĉeĥoslovakio, la proklamo de ĉi tiu leĝo estis nur logika aprobo de la fakto, ke ne estas diferenco inter la popolo kaj la registaro. Por ni la paco estas bazo de ĉia vivo, estas sumo de ĉio pozitiva, kio rezultas el kreado de la nova socio. La socialisma socio, por kiu la popola bonstato estas la ĉefa afero, ne bezonas militon; en la socialisma socio neniŭ profitas el milito, kaj ĉiuj malprofitas. Nia celo: **La mondo sen malamo, la mondo sen milito** — ne estas abstrakta meditado, ne estas senviva teorio; mi mem ĉiutage konvinkiĝas pri tio, estante kiel pastro en ĉiutaga kontakto kun multaj homoj. En nia lando fakte ni ĉiuj estas pacdefendantoj, ekde la lasta civitano ĝis la prezidento de la Respubliko. Do, ne estas mirinde, ke dum la dekjara valideco de la leĝo pri defendo de paco mi apenaŭ memortenis ĝin; laŭ mia scio, ĝi, estis aplikita nur du aŭ trifoje.

Nunjare la Nacia parlamento akceptis novan konstitucion de la Ĉeĥoslovaka socialisma respubliko, kaj jam en la unua artikolo de ĉi tiu baza leĝo de nia ŝtato estas deziro pri la paco kaj amikeco kun ĉiuj popoloj en la mondo klare fiksita.

Dek jaroj inter la leĝo pri defendo de paco kaj inter la nova konstitucio ...

Dek jaroj pli frue estis nenio en la historio. Dek jaroj en la nuna tempo kapablas aliigi vizaĝon de la tero. Ni ekmarŝis la vojon al socialismo, kaj jam ni vidas fruktojn de nia laboro. Ekzemple — kiom da novaj lernejoj, malsanulejoj, fabrikoj kaj hejmoj estas konstruitaj! Precipe en regionoj pli frue malriĉaj, kien nun laboro venis post ĝia loĝantaro, la progreso estas des pli klare videbla. Ĉesis jam fluadi valora sango el vundoj de nia patrujo en formo de miloj da elmigrintoj en fremdlandojn por laboro. Neniu ĉe ni timas senlaborecon, neniŭ suferas pro mizero, manko aŭ malsano. Multo ŝanĝiĝis, sed — kio estas la plej grava — ŝanĝiĝas homoj, ni ĉiuj ŝanĝiĝas. La liberita laboro, tio estas longdaŭra procedo, en kiu la homo lernas ami la laboron, opinii ĝin kiel sencon de sia vivo. Li eĉ lernas vivi novmaniere. Novmaniere en tio, ke li ne laboras sole por si mem kaj iam eĉ kontraŭ la aliaj, sed li laboras kune kun la aliaj. Li lernas ami alian homon sen balasto de egoismo kaj envio.

Tre signifoplenan ŝanĝon mi vidas en la fakto, ke la regado estas en manoj de la popolo, kiel jam antaŭ longe profetis la granda Instruisto de nacioj, Jan Amos Komenský. Pli frue oni diradis: „Politiko estas malpura afero, kaj honesta homo evitas ĝin plejeble“. Certa-grade oni pravis: dekoj da politikaj partioj per diversaj intrigoj akiradis pli aŭ malpli grandan influon en administrado de la ŝtato kaj per tio eĉ kvoton da avantaĝoj. Tial pli frue okaze de balotadoj estis aplikataj la plej malpuraj rimedoj per malkovrado de abomenaj aferoj kaj kalumniado de kontraŭuloj. Post la balotado restis ĉio kiel antaŭe, kaj balotpromesoj estis tuj forgesitaj. Hodiaŭ ni komprenas la politikon novmaniere, kiel ĉiutaĝan kunlaboron de ĉiuj civitanoj en administrado de la vivo en komunumo, distrikto, regiono aŭ en la tuta ŝtato. La nova konstitucio en artikoloj pri naciaj komitatoj kaj ilia altgrada decidrajto pruvas, ke la regado transiras malsupren, en manojn de la popolo. Pli multaj okuloj pli bone vidas, kio estas farena por pli trankvila kaj pli ĝojiga vivo, pli bone vidas eĉ mankojn forigendajn. Nuntempe ni komprenas la politikon kiel reciprokan respondecon; kreskas kolektiva observado de la socia kaj ĝusta vivo. Ni jam ne estas kapablaj imagi al ni unuopulon kiel posedanton de fabrikoj kaj metalurgiaj uzinoj, elektrejoj, grandbieno kaj forstoj aŭ ja eĉ servutuloj. Ni jam progresis ankaŭ koncerne la homan vivmanieron. Ni jam ne ridas vidante, ke iu ebriiĝis — tio ja ne estas lia privata afero! Ni ne restas indiferentaj, se iu detruus

familion kaj donas malbonan ekzemplon al nova generacio; ankaŭ tio jam ĉesis esti privata afero! Aŭ la rilato al la komuna havaĵo: se perdiĝas laborilo, instrumento, konsistaĵo aŭ materialo, oni jam ne gestas indiferece: „Tio ja apartenis al fisko, do, ne gravas ...“ Kaj des pli grave, se iu parolus aŭ agus kontraŭ trankvila kunvivado de popoloj aŭ rasoj, estante ŝarĝita ekzemple per eksmodaĵo de antisemidismo. Tio ja nepre ne estas afero de privata opinio.

Kontraŭe, se estas necesa helpi al komuna laboro ĉiam troviĝas sufiĉe da volontuloj, kiuj senpage, en sia libera tempo, venadas helpi. Kreiĝis nova patriotismo: **Fari pli multe, ol estas sole mia devo!**

El ĉio, kio ni nun faras, estas videbla sopiro pri paco, pri paca kunvivado kun ĉiuj bonvolaj homoj en la mondo. Paca devizo de prezidento Klement Gottwald: „Konstruadu la patrujon, vi plifortigos la pacon!“ kio de post komenco fariĝis devizo de la ĉeĥoslovaka porpaca movado, ne perdis kaj tute ne perdis sian signifon. Ni vivas en atmosfero de ascendo, kaj prospero, celante antaŭen!

Malamiko de ĉi tiu vivo en paco kaj gajeco estas milito. Tial niaj samlandanoj malamas ideon de milito. Tial kun granda indigno ili rigardas al nia mallonga landlimo kun la Germana Federacia Respubliko, de kie oni aŭdas ne nur pri armigado de tiea armeo per atomarmiloj, sed de kie aŭdiĝas ankaŭ alvokado pri revenĝismo kaj aliigo de limoj, do nenio alia, ol preparoj de nova milito! Agresaj vortoj el ia okcidenta Germanio rememorigas pri teruraj krimoj. kiujn en nia lando faris nazianaj bandoj. Agresaj vortoj eble celas ĝuste al plifortigo de la malvarma milito, al malhelpo de proksimiĝado, al formado de abismo. Tie, en la okcidenta Germanio, bedaŭrinde ne ekzistas leĝo pri defendo de paco, sed kontraŭe, oni preparas leĝon pri rejtsuspenda stato ...

Sed, milito jam fariĝas anakronismo. Ankoraŭ la franca reĝo Ludoviko rajtis skribi sur siajn kanonojn: *Ultima ratio regum* (lasta argumento de reĝoj). Nuntempe la paco estas pli forta kaj venkos, kiel venkas vivo super morto. La bonvolaj homoj el ĉiuj landoj devas unuiĝi por defendi pacon, senkonsidere, ĉu ili havas por tio laĝon aŭ ne. Do, ĉiuj unuopaj voĉoj de sciencistoj, pastroj, verkistoj, voĉoj de ĉiuj laboruloj per manoj kaj per spirito fariĝu potencaj reakcion, kurantan de koro al koro, **por ke ne okazu malfeliĉo, ke la homo pereigus vivon sur la tero en la momento, kiam li eltrovis rimedon, per kiu li estas kapabla fari tion!**

MESAĜO DE LA PREZIDANTARO DE ĈEĤOSLOVAKA PACDEFENDA KOMITATO AL ĈIUJ EŬROPAJ PACMOVADOJ KAJ PACDEFENDAJ ORGANIZOJ

Pacdefendantoj en la Ĉeĥoslovaka socialisma respubliko, kiu senpere najbaras kun la okcidenta Germanio, kaj kies popolo amare spertis atakeman germanan militarismon kaj revenĝismon, plurfoje atentigis siajn geamikojn en pacmovadoj de ceteraj landoj pri danĝera evoluado en ia Germana federacia respubliko.

En la lasta tempo, la tuta mondo laŭ multaj konkretaj okazintaĵoj povis klare konvinkiĝi pri tio, ke militpreparoj de la registaro de Germana federacia respubliko atingis novan, eksterordinare danĝeran periodon. Ĝi estas karakterizata per obstina klopodo, akiri ĉia-preze por la okcidentgermana armeo la plej modernajn nukleajn kaj raketajn armilojn, kaj samtempe per sistema plifortigado de revenĝemaj tendencoj, kiuj celas ideologie prepari la okcidentgermanan loĝantaron por agresiva militaventuro. Ĉi tiuj tendencoj senpere endanĝerigas sekurecon de ĉiuj eŭropaj popoloj kaj la mondan pacon.

La spertoj kun la germana militarismo konvinkis nin pri tio, ke ekzistas grava danĝero: Se la militarismaj potencoj en la okcidenta Germanio proprigos al si nukleajn kaj raketajn armilojn, ni povas ekesti vid-al-vid sub direkta minaco de ilia uzado cele atingi revenĝemajn celojn. La militema kaj revenĝema politiko, sisteme aplikata en la okcidenta Germanio kun direkta subtenado

kaj partoprenado de la registaraj reprezentantoj de la Germana federacia respubliko kaj kun subtenado de okcidentaj grandpotencoj, kreas por tio ĉiujn supozojn.

Estas epoka ordono por ĉiuj pacamaj potencoj de la mondo kaj antaŭ ĉio de la eŭropa kontinento, ke ili energie kontraŭstaru ĉi tiun minacon kaj entreprenu laŭ sia forto ĉion, por fini ĉi tiun danĝeran ludon kun fajro.

La ĉeĥoslovakaj pacdefendantoj senescepte subtenas komunan deklaron de registaroj de Germana demokrata respubliko, Pola popola respubliko, Unio de socialistaj sovetaj respublikoj kaj Ĉeĥoslovaka socialisma respubliko el la 10-a de oktobro 1960. La deklaro, per kiu la registaroj de la nomitaj kvar landoj turniĝis al popoloj kaj registaroj de ĉiuj landoj, montras, kie bazas la danĝero de samtempa evoluo en okcidenta Germanio kaj ankaŭ, kio estas farenda por ĝia forigo.

En nomo de la pacdefendantoj en Ĉeĥoslovakio ni turniĝas al eŭropaj pacmovadoj kaj eŭropaj porpacaj organizoj ni alvokas ilin

— *okupi sin konsekvence pri danĝera evoluo en okcidenta Germanio, kaj en sia laboro fari efikajn aranĝojn por aktivigado de pacaj potencoj kontraŭ la okcidentgermana militarismo kaj revenĝismo;*

— *kunigi siajn fortojn kaj per komuna klopodo malebligi endanĝerigon de la paco per la germana militarismo kaj reveĝismo, kaj ne allasi armigadon de la okcidentgermana armeo per nukleaj kaj raketaj armiloj;*

— *uzi ĉiujn siajn eblojn por solvo de la germana problemo per interkonsento de kontrakto pri paco kun ambaŭ germanaj ŝtatoj.*

Ni proponas, ke eŭropaj pacaj movadoj kaj porpacaj organizoj interkonsentu komunajn agadojn, kiuj celus mobilizon de ĉiuj eŭropaj popoloj por efika batalo cele likvidi la novan militfokuson kiu nuntempe kreiĝas en la plej danĝera formo en la okcidenta Germanio.

La ĉeĥoslovakaj pacdefendantoj entreprenos ĉion por sukceso de ĉi tiu nobla komuna klopodo, kies celo estas certigi pacon kaj sekurecon de eŭropaj popoloj.

Praha, la 21-an de oktobro 1960.

Prezidantaro de la Ĉeĥoslovaka pacdefenda komitato.

LA TRIA KVINJAR-PLANO DE ĈEĤOSLOVAKA SOCIALISMA RESPUBLIKO

Docento Inĝ. Viktor Pavlenda kandidato de ekonomiaj sciencoj Rektoro de l' Ekonomia
altlernejo en Bratislava, ĈSSR

La social-ekonomiaj kaj politikaj metamorfozoj, okazintaj dum — kaj precipe post la dua mondmilito en la mondo kaj ankaŭ en Ĉeĥoslovakio mem, kondukis efektive al estiĝo de popola demokratio, kiel formo de ŝtata potenco de l'popolo, en kies kondiĉoj la popoloj ĉeĥa kaj slovaka komune progresis de sukceso al sukceso. Februaro 1948 — kiam finiĝis la konsiderinda etapo de l'transformiĝo de la nacia kaj demokratia revolucio en revolucion socialisman — enpemis fine al la ĉeĥoslovaka popol-demokratio kun definitiva valideco la karakteron de socialisma ŝtata sistemo.

Longdaŭra „preparo“ al la tria kvinjar-periodo.

La menciitaj plej gravaj politikaj aspektoj de la postmilita evoluo de Ĉeĥoslovakio estis decidaj el du, sin reciproke kondiĉantaj vidpunktoj. Unue el vidpunkto de estigo kaj disvastigo de l'kondiĉoj por impeta evoluo en ĉiuj sferoj de la socia vivo; due, el vidpunkto de impeta evoluo de ĉeĥoslovakio, mem.

Kaj la unua, kaj la dua efektiviĝadis kiel seninterrompa laŭleĝa procezo dum de la unua ĉeĥoslovaka kvinjar-plano pri l'evoluo de la nacia ekonomio (1949—1953) kaj dum la dua kvinjarperiodo (1956—1960).

Mallonga resumo de la decidaj social-ekonomiaj kondiĉoj, al kiuj la nuna Ĉeĥoslovakio dankas la atingitajn sukcesojn, rajtigas aludi precipe al jenaj:

- a) al la estiĝo, disvastiĝo kaj laŭgrada plifirmiĝo de la ŝtata socialisma sektoro en ĉiuj branĉoj de nacia ekonomio;
- b) al kreado de nova sektoro por kooperativa grandproduktado, precipe en agrokulturo;
- c) al realigo de principa struktura rekonstruo de la malnova, de l' kapitalismo heredita material-produkta bazo.

Guste sekve de la menciitaj faktoj la evoluprocezo de l' produktaj fortoj en postmilita Ĉeĥoslovakio ne nur seninterrompe (sen minimumaj signoj de l' ekonomia krizo), sed eĉ kun aparte forta elano okazadis.

Se ekzemple la industria produktado dum 20 jaroj de kapitalisma ĉeĥoslovaka respubliko kreskis je 36 % (kompare al 1913), en popoldemokratia Ĉeĥoslovakio sole dum la jardeko 1948—1958 ĝi kreskis trioble kaj hodiaŭ superas la nivelon el jaro 1948 jam tri kaj duonoble. La meza jara kresko de la industria produktado por la menciita periodo faris pli ol 11 %, dume en la monda kapitalisma sistemo ĝi moviĝas preksimume sur nivelo 4 %-a.

Eĉ pli emfaze evidentiĝas de la nova socia sistemo, se ni observas almenaŭ la plej gravajn indikilojn de la ekonomia kaj kultura evoluoj de pli ol primitiva Slovakio (laŭ evolu-kondiĉoj en aŭstro-hungara monarĥio kaj en burĝa ĉeĥoslovaka respubliko).

Post formiĝo de burĝa ĉeĥoslovaka respubliko en la jaro 1918 Slovakio postrestis la ĉeĥajn provincojn je 50—70 jaroj. Tio evidentiĝis per vegeto de komenciĝanta industrio, kronike alta senlaboreco, amasa elmigrado post laboron, agrara troloĝateco, per mizera financa kaj kultura

situiteco de la loĝantaro. Nek la burĝa ĉeĥoslovaka respubliko, nek la faŝisma „slovaka ŝtato“ (1939—1944) — instrua ekzemplo de „hitlera zorgemo“ pri malgrandaj nacioj — ŝanĝis (kaj fakte eĉ ne kapablis ŝanĝi) la kompatindan situacion de Slovakio.

Kiel akre kontrastas ĉi tiun konstaton la nuna ĝojiga slovaka realo kaj la rezultoj, ĝin en ĉiuj sferoj de l' vivo en Slovakio sekvintaj.

Kiam la industria produktado en la hodiaŭa Ĉeĥoslovakio kreskis kompare al la jaro 1937 proksimume kvaroble, en Slovakio dum la sama periodo ĝi atingis preskaŭ dekoblan kreskon. Krome la kontingento de Slovakio en la tutŝtata industria produktado nuntempe reprezentas ĉirkaŭ 20 %, dume en la jaro 1937 ĝi ne superis 8—9 %-n.

Estus eble citi tutan serion da analogaj indikoj pri enorma kresko en la sektoro de l' industria produktado, pri investoj en la nacian ekonomion, sukcesa antaŭeniĝo de la kooperativa agrikultura produktado, pri rapida grandiĝo de la detalkomerca cirkulado, altiĝo de personaj kaj sociaj konsumadoj ktp. Ĉiuj samspecaj indikoj rajtigas je unusola konkludo: **la preskaŭ 70 jara postrestado de Slovakio (kompare al ĉeĥaj provincoj) estis esence forigita dum 10 jaroj de la socialisma konstruado.**

Definitiva venko de socialismo en Ĉeĥoslovakio.

Parolante pri sukcesoj, atingitaj de la nacioj de Ĉeĥoslovakio, estas necese havi antaŭ okuloj ankoraŭ unu ĉefaspekton: la ĝisnunaj sukcesoj en la evoluo de la nacia ekonomio estigis kondiĉojn, ke Ĉeĥoslovakio povu eĉ kun pli rapida elano plumarŝi la vojon de novaj labor-venkoj kaj sukcesoj.

Al ĉi tiu konstato rajtigas nun la fakto, ke en Ĉeĥoslovakio definitive venkis la socialismo en la jaro 1960. Praktike tio signifas, ke en la tuta nacia ekonomio regantan postenon havas la novaj socialismaj produktaj rilatoj, ke en la tuta socio ĉesis ekzisti antagonistaj klasoj, ke en ĉiuj branĉoj de la materiala produktado venkis la mekanizita grandproduktado, ke regule kreskis kaj kreskas la vivnivelo de la tuta socio.

ĈEĤOSLOVAKIO KRESKAS EN BELECON KAJ FORTON.



Ĉiutage kreskas la muroj de komfortaj hejmoj.

La tria kvinjaro, — konstru-plano de matura socialisma socio.

Baze de donitaj kondiĉoj la tria kvinjar-plano devis enteni taskojn, kies komuna numeratoro estas la konstruado de matura socio socialisma en Ĉeĥoslovakio kaj prepariĝo por pograda transiro al komunismo.

Konforme al la menciitaj la socia produkto dum la tria kvinjaro altiĝos tiel, ke la naciaj enspezoj kreskos minimume je 42 %. En la industrio la ĉeftasko baziĝas sur konsiderinda altiĝo de la labor-produktiveco, precipe baze de ĝenerala altiĝado de l'teknika nivelo en la nacia ekonomio, atingebla

pere de teknika rekonstruo kaj kompleksa perfektigado de l'teknik-organiza nivelo de la produktaj procezoj. Profite al realigo de tiu ĉi tasko preferige estos plu evoluigata la fabrikado de produktaj rimedoj, kaj precipe maŝinindustrie, kiel ĉefartiklo en sektoro de la materiala produktado.

En sfero de l'agrokultura produkto la kvinjaro supozas realigi tiajn aranĝojn, - kaj baze de ili tian paŝon antaŭen - kiuj alproksimigas la nivelon de la terkulturado pgrade al la nivelo de l'industrio.

Sociala senco de la tria kvinjaro - simile al la antaŭaj kvinjaroj - estas sekurigi al la popolo pluan egalmezuran altiĝadon de vivnivelo, fare de altigo de persona kaj socia konsumado, mallongigo de la labordaŭro kaj plibonigo de labor-kondiĉoj.

Plua florado de Slovakio en socialisma Ĉeĥoslovakio.

En nuntempa periodo en Ĉeĥoslovakio oni intense laboras pri ĝenerala plano de l'evoluo ĝis la jaro 1980-a, pri konstruplano de la material-produkta bazo por komunismo. La tria kvinjaro estas ĝia parto kaj elir-etapo. Ĉi tiu fakto estas projekciata en la tria kvinjaro same el la vidpunkto de la tutŝtata evoluo, kiel de Slovakio.


Ni jam menciis, ke la profunda ekonomia kaj kultura primitiveco de Slovakio estis esence forigita dum 10 jaroj de la socialisma konstruado. Tial la tria kvinjaro plue kalkulas kun pli rapida elano de la produkta evoluo en Slovakio, ol en tutŝtata amplekso. La industria produktado en tutŝtata mezuro devas proksimume duobliĝi; en Slovakio ĝi altiĝos ĉirkaŭ du kaj duonoble.

La kontingento de la industria produkto en Slovakio estos altigita de 17,7 % en la jaro 1960 je 20,4 % en 1965.

La investoj - kompare al la dua kvinjaro-tutŝtate altiĝos proksimume je 57 %, en Slovakio proksimume je 70 %. El la indikiloj de l' vivnivelo meritas atenton unuavice la detalkomerca spezo. Ĝi altiĝos dum la kvinjaro je pli ol 65 %. Samtempe la kresko de l' vivnivelo de la laboruloj en Slovakio evidentiĝos en alta kresko de persona kaj socia konsumadoj.

Laŭkvalite nova motivo de l'evoluo de la nacia ekonomio en Slovakio dum 1961—1965 estos la fakto, ke la planita evoluo de produktaj fortoj estas sekurigata ne nur el vidpunkto de l' altigo de la nivelo ekonomia en Slovakio, kiel tuto, sed ankaŭ tial, ke principe solviĝos ankaŭ problemo en interregiona rilato. Temas nome pri postrestintaj regionoj de orienta kaj sudo-rienta Slovakio, En tiu rilato neblas ne menciiti kiel ekzemplon, la konstruon de orientslovaka feruzino, de verko, kiu kun sia giganteco superas eĉ la plej grandajn konstruaĵojn de ĝisnuna socialista konstruado en Ĉeĥoslovakio. Post ĝia ekfunkciigo nur ĉi tiu unusola produktejo donos pojare ĉirkaŭ 4,000.000 tunojn da ŝtalo; tio signifas proksimume 100 kg da ŝtalo je unu loĝanto, kio estas nivelo, kiu nun ne havas paron en la mondo.

Sekve de ŝtorma evoluo de produktaj fortoj en Slovakio — kiu iam reprezentis agraran balaston al la industrie evoluintaj ĉeĥaj regionoj kaj nun jam mem estas evoluinta industri-agro-kultura ero de ĉeĥoslovaka socialisma respubliko, do Slovakio fariĝos moderna industria parto de ĝi kaj gravmezure influos la tutan ekonomian vivon de la respubliko. Tio samtempe estos decida paŝo al la



Potenca forto de slovakaj riveroj, katenita per multaj valbarajoj, servas por plua paca konstruado.

finfaro de ekonomia kaj kultura egaligo de Slovakio kun la ĉeĥaj regionoj ĝis la jaroj 1970—1975.

* * *

Estis historia sorto de slovakoj, ke ili plejparte ne povis decidi eĉ pri sia nura vivo. La 1945-a jaro turnis por ĉiam la lastan paĝon de nevolonte sin memoriganta historio de la slovakaj nacio.

Kiom pli kontrastas ĉi tiu fakto la nunon, kiam la slovakaj nacio kiel socialista, samgraden starigita al la frata socialista ĉeĥa nacio, partoprenas ĉiam pli kaj pli en la direktado de la tuta socialisma respubliko kaj decidas pri plua florado de Slovakio en la socialisma Ĉeĥoslovakio.

(Tiun ĉi artikolon aparte verkitan por PACO esperantigis G n o f a l i o)

Andrej Plavka :

MI, FERKO JAN . . .

Mi, Ferko Jan el Malužina,
lernanto de la kvara klas',
mi vivas en la land' patrina;
belkreskas tie en amas'
abioj, trutoj en torento,
kiujn mi kaptas per la man'.
Amikoj ĉiam kiel vento
ludadas kun mi kun elan'.
Dimanĉo gaja se ekridas
post falĉo, kiam brilas sun',
ho, tiam oni ĉe ni vidas
belegajn tagojn de l'aŭtun'.

Hieraŭ timis mia panjo,
ekfulmis ŝia paca vid',
ŝi aŭdis de onklino Anjo
timigajn vortojn pri milit'
Eĉ mi la lakton ne elsorbis;
maljuna avo en atent'
orelojn streĉis — lin absorbis
malgaja, nigra antaŭsent'.
Kaj poste forte ekblasfemis
per raŭka voĉ' de maljunul':
„Inferpreparojn fari venis
satankanajloj sen skrupul'!”
Rigardis mi okulojn liajn
— blindiĝis ili dum milit' —
mi aŭdis jam terurojn tiajn,
ĉe kiuj mortis ĉies rid'

Pereis patro en la dua,
aperaŭ mi memoras lin —
ĉu estos ie mano plua,
kiu en mondon gvidos min?
Avidas homoj malbonfaraj
je niaj kampoj kaj montar',
vilaĝoj, patroj, panjoj karaj,
laboro paca en kampar'.
Ili nin lasu en la paco
kun sia aĉa instrument',
ne volas mi jam la minacon
de kuglofajfo kaj trument'...
Mi volas sur la fojno ludi,
ekkoni landojn de l'tutmond'
geografion bone studi,
pri palmoj, cedroj, horizont',
kie la maro brilas ore,
al kiu fluas la river',
saluti kamaradojn kore,
aŭdigi voĉon de l'esper'
samfortan kiel oceano,
por novaj vivo kaj epoko,
forigi kriojn de l'satano.
De dek junjaroj sonas voko:
Por pac' en ĉiu land' patrina —
Mi, Ferko Jan el Malužina.

Tradukis: P. Rosa

ATESTO DE L'INFANO



Naziistaj „herooj“ murdis eĉ infanojn...

„Ni kutimiĝis stariĝi je la sepa horo matene, je la tagmanĝa horo kaj denove je la sepa horo vespere en longaj vicoj kun la gamelo en la mano kaj atendi, ke oni donu al ni iom da varma akvo kun sal- aŭ kafo-gusto aŭ eble paron da terpomoj. Ni kutimiĝis dormi sen litoj, saluti ĉiun uniformon, iun fojon ne iri sur la trotuaro kaj alian fojon iri nur sur la trotuaro; ni kutimiĝis pri senmotivaj vangofrapoj, perfortaĵoj kaj ekzekutoj, ni kutimiĝis vidi homojn morti en sia propra fekaĵo, preteriri ĉerkojn plenaj de homkadavroj, vidi malsanulojn en naŭziga koto kaj senkonsilajn kuracistojn ...“

Tiuj ĉi vortoj estis skribitaj de la 14-jara Prag-naskita Peter Fischl en prozolibro kun desegnoj faritaj de infanoj en naziistaj koncentrejoj en Ĉeĥoslovakio. Ĝi estas titolita „La taglibro de Pavel Bondi“ kaj li skribis ĝin post kiam li en decembro 1943 estis ekzilita al Theresienstadt. De tie li estis forkondukita al Auschwitz, kie li estis mortigita la 8. de oktobro 1944.

La malgranda fragmento ĉi-supra enestas en libro eldonita de la Juda Ŝtatuzeo en Prago kun la germana titolo „Kinderzeichnungen und Gedichte aus Theresienstadt 1942—1944“. Fantasta dokumento, timiga kaj te-rura, sed ankaŭ kortuŝa kaj skuiga pruvo pri la nevenkebla volo de la homo neniam perdi la esperon — kiel ajn mallume la nuno estas.

Theresienstadt estas la germana nomo de fortikaĵa urbo, sesdek km de Prago. Italaj militingeneroj konstruis ĝin sub la imperiestro Jozefo la II-a. En 1941 la „regnoprotektoro“ Reinhard Heydrich ordonis, ke Theresienstadt transformiĝu en judan geton. Tiel ankaŭ okazis. En 1943 troviĝis tie 41.552 ekzilitaj judoj, kio signifas, ke ĉiu disponis pri nur 1,6 kvm da spaco en la loĝejoj. La labortempo estis 80—100 horoj en semajno. Kaj infanoj, kiuj atingis la aĝon de 14 jaroj, havis saman labordevon kiel la plenkreskuloj. La stato en la geto estis tia, ke mortis 100 personoj tage. Vivaĉis tie 15.000 infanoj ĝis ili estis transportitaj al neniigaj fabrikoj — el inter tiuj infanoj revenis apenaŭ 100. La verko kompreneble kondukas la pensojn al la „Taglibro de Anne Frank“. Sed la libro de Peter Fischl estas dokumento, kiu multe pli forte akuzas la naziismon kaj ĝiajn fisoldatojn.

Nun ni skribas 1960. La naziismo daŭre estas minaco. Hitlero estis nur unu el ĝiaj aperformoj. En sia esenco la naziismo (faŝismo) estas sociala reakcio, embuskanta kontraŭevolucio kaj konstantaj militprovokoj. Seninterrompa gardoservo tial estas necesa. „La taglibro de Pavel Bondi“ havas principan signifon por ĉiuj antifaŝistoj-pacdefendantoj en ilia seninterrompa batalo por paco, libereco, kulturo kaj humaneco.

Jaroslav Bohun, ĈSSR.

Stefan Békeffy:

LA HUNDO, KIU NOMIĜIS SINJORO BOZZI

Ĉi tio estas la punejo por hundoj kaj ĉi tion vi devas jesi. Ĝia nomo estas skribita sur la ekstera pordo. Sed estu punata ankaŭ la homo, kiu surstraten lasas sian hundon sen kondukilo kaj buŝumo; li devas punpagi. La homo legis la oficialajn komunikojn kaj scias la punparagrafojn.

La hundoj ne scias legi — almenaŭ ne ĉiuj hundoj — kaj ili estas simple kondamnitaj al morto. Kiel signife homa ja estas ĉi tiu senkompata, malnobla mezuro duspeca!

Bone! Ni diru, ke rabiaj hundoj ankaŭ ekzistas, kiuj povas mordi homon kaj tial homon endanĝerigi je korpo kaj vivo. Estas laŭorde. Oni kaptu kaj esploru ilin! Sed kio estas kun la homoj, kiuj estas same danĝeraj kaj vagadas libere?! Ili eĉ veturas tra la mondo per aŭtoj kaj flugmaŝinoj

kaj la zono de danĝero kreskadas senmezure. Kion signifas kompare iu unuopa hundo rabia, se oni metas ĝin kontraŭ la multo da rabiaj soldatoj kaj politikistoj ?

Trad.: **D-ro A. Halbedl**, Aŭstrio

VOĈO DE VIRINOJ

Sub la nomo **Voĉo de Virinoj** fondiĝis je la 28-a de julio 1960 en Toronto, Kanado, virina movado, kiu celas fariĝis tutmonda. Ĝi volas rezisti al la minaco de milito per pozitivaj agoj (i. a. per grandskala internacia korespondado) kaj kontribui senpartie al politika malstreĉiĝo inter la grandpotencoj. Ĝi intencas praktike apliki Esperanton por la Paco. Tial la **Voĉo de Virinoj** estu aŭdata kaj resonigata de la esperantistaro. Ili petu kanadajn korespondantinojn kaj pli da informoj de **Voĉo de Virinoj**, P. O. Box 88, Port Credit, Ontario, Kanado.

LIA LINGVO

Samuel Gordon

Foje mi vizitis hospitalon, kie kuŝis mia amiko-samregimentano. Tie mi informiĝis, ke la kamarado jam foriris frontlinion.

Mi decidiĝis atendi la ĉefkuraciston por ekscii la adreson de la kamarado.

Estis printempa varma tago. La hospitalo situis enĝardene. Aromo de malfermiĝantaj burĝonoj atingis ĉi tien, sin miksante kun odoro de la medikamentoj. Tra la altaj fenestroj la suno kovris per orkolora polvo la sternitan laŭlonge de la koridoro diverskoloran tapiŝon, la fikusojn, benkojn kaj mol-kanapojn apud la muro.

En la koridoro promenadis kuracatoj. Paŝante preter vitra pordo, ili haltis, okulumante unu la alian. Post ero da tempo sanitaro portis tien gazetpaketon. Forirante, li lasis la pordon iom nefermita.

Kiam la koridoro malpleniĝis — venis la horo de tagmanĝo. Mi levis min desur la kanapo, paŝis al la pordo tra kies vitroj mi ekvidis negrandan ĉambron sunverŝitan. Mezĉambre staris lito, apud ĝi kelke da seĝoj kaj eta tablo sur kiu estis metitaj ĵurnaloj kaj gazetoj.

Sur la muroj de la ĉambro pendis ial multe da pentraĵoj. Dorse al mi sidis kontraŭ la fenestro persono kun la kapo bandaĝita. En la mano li tenis penikon.

Io min logis en la ĉambron.

— Ĉu vi permesas?

La homo sidinta apud la fenestro returnis sin, afable kapgestis kaj daŭrigis sian laboron.

Mi staris meze de la ĉambro kaj observadis la pentraĵojn. Baldaŭ mi estis forgesinta, ke mi estas en hospitalĉambro. Ŝajnis al mi, ke mi venis en vastan stepon, riĉan je suno, kaj kvazaŭ mi enspiras la odoron de ĵus falĉita fojno, ke min karesas malvarmeto de freŝa vento, ke mi aŭdas la grajnsusuron sub la flugiloj de kombajnoj. Sur unu el la rikoltmaŝinoj sidas junulo. Liaj grandaj nigraj okuloj ridetas al la stepo, al la belstatura junulino apud li. Sur la monta deklivo sin etendas vilaĝo: neĝoblankaj etdomoj, aro da plantoj. Ĉio per sunradioj surverŝita, en la ĉielo eĉ ne unu nubeto.

Longdaŭre mi rigardis la bildon. Tre malfacile oni povus kredi, ke antaŭ la okuloj estas pentraĵo. Venigi sur la tolon tiom da ĝojo, tiom da lumo kaj ĉarmo povas sole artisto, kiu kapablas trasenti la grandan ĝojon de la vivo. „Sur mia paca hejmlando” — legis mi subskribon kaj etlitere: „Motel Milŝtejn”.

— La pentraĵoj estas viaj ?

La vundito kapjesis kaj ree profundiĝis en la laboro.

Mi miris. Kial li evitas paroli?

Mi iris al la dua pentraĵo, al la tria, kvara kaj subite saltis for. Brulego! Urbo dronanta en flamoj. Apud brulanta domo sidas knabineto kaj per grandaj timoplenaj okuloj vidas kiel la flamoj proksimiĝas al ŝia malviva panjo, kuŝanta apude. Sur la antaŭa placo inter verdaĵo staras duetaĝa domo. Sur ĝi ŝildeto: Kliniko por psike malsanaj. Taŭzitaĵoj, viloharaj, nudpiedaj, sovaĝe ridegantaj kuras malsanuloj; ilin postkuras faŝistoj, amuziĝante per la spektaklo ... La tolo rekrias: „Malamiko venis nian hejmlandon”!

Delonge jam pasis la posttagmezo. Mi ĉiam staris ĉe la pentraĵoj.

En angulo de ĉi-hospitalĉambro pendis desegnaĵeto enkadra. Vintra vespero. Mezkampe granda altaĵo sub neĝo. Sur la altaĵo kuŝas senmove kelkaj ruĝarmeanoj. Ili estas malvivaj. Nur du batalantoj agas ankoraŭ. Unu havas la okulojn forte bandaĝitajn. El sub la bandaĝo falas neĝoblankon sangogutoj. Blinda, li tenas aŭtomatfusilon direkten al la kampo, de kie la faŝistoj atakas. La dua subtenas per mano vundita la aŭtomaton de la blindulo. Li regulas, montrante la pafcelon, tenante grenadon per la alia mano. Subskribo: „Por nia hejmlando!”

Mi staris malantaŭ tiu ĉi junhomo emocie observante kiel firme li agas per la peniko. Nova bildo estis ankoraŭ nefinita. Sed videble estis, ke li pentras sin mem: Soldato en griza uniformo, prete staranta kun fusilo ekpafonta. Sube la moto: „Mia lingvo!”

Mi ekparolis. La junulo respondis skribe: „Pardonu, venu post kelka tempo!” Mi iris for, meditante pri la viditaĵo. Survoje al la ĉefkuracisto, mi renkontis flegistinon.

Ŝi rakontis jenon pri Motel Milŝtejn:

— Li estas ĉiam pentranta. Tre malfacile estas logi lin for de la pentrado. Jam estas la kvina monato depost kiam oni metis lin ĉi tien grave vundita. La kuglo trafis la nukon, elirinta tra la buŝo. Nun li preskaŭ resaniĝis. Sed li ne kapablas paroli.

— Por ĉiam?

— Jes!

— Ĉu li scias ĉi tion?

— Li scias ĉion! Pentrado estas la sola lingvo per kiu li rakontas la travivaĵojn.

Mi estis irinta for, paŝante malrapide, forportinte en la imago bildaron, kiu atestas pri la eterna malhonoro de la hitlerismo . . .

El la lingvo hebrea (jida) lingvo, Branzburg, Luga, USSR.

HIMNO

Nikola VAPCAROV

Senĉese impetu, konstruu
muregojn el fer' kaj beton'!
La plago de l' jugo *homskaa*
fordronas nebule sen son'.

Starigu ĉielen antenojn
disrompu silenton per fajf'!
kaj ĝojaj ni iumatene
renkontu progreson en gaj'!

Ĉar ĉiu altanta jam domo
subtene al volb' de lazur',
fortiko ĝi estas por homo,
por paca laboro, plezur'.

Impete, kuraĝe al nuboj —
al ritme zumanta motor',
fluganta en spaco senruba —
masonu muregojn el kor'!

Starigu ĉielen antenojn,
disrompu silenton per fajf'!
Kaj ĝojaj ni iumatene
renkontu progreson en gaj'!

El bulgara tradukis: Canko Murgin

»KUBO - JES, JANKIOJ - NE«

Kubo — ĉarma, admirinda lando; lando loĝata de 6-miliona liberama kaj laborema popolo, multe ekspluatata en la pasinteco fare de usonaj monopoloj, kiaj „United Fruit" kaj aliaj.

Pro la venko de la kuba demokratia revolucio, proklaminta sendependecon de Kubo, la militplanoj de Pentagono (la usona militministerio) ricevis fortan baton.

Pentagono planas aranĝi siajn raketbazojn en la ekvatoraj landoj, ĉar la raket-ĵetado de sur la ekvatorzonaj landoj estas teknike pli oportuna: pli malgranda flankeniĝo de la ĵetitaj raketoj, pli granda ilia tirpovumo (je 15—20%), ol ĉe la ĵetitaj en la mezaj latitudoj (ekz. New York).

La plej oportuna loko estas Kubo. Sed la revolucio miksis la kartojn de Pentagono, furioziginte ĝiajn generalojn. Tial Pentagono post la senrezulta minacado al la registaro de Fidel Kastro, klopodas pri interveno en Kubo, helpe de siaj paraŝutistoj kaj milita floto, por sufoki la kuban revolucion kaj por submeti la sendependan kuban popolon reen sub la feran kalkanumon de „United Fruit Co" kaj Pentagono.


Pentagono planas aranĝi en la ekvatora zono 10 raket-bazojn por kio ĝi ricevis de sia registaro 100 milionojn da us. dolaroj. Sed la landoj, kie estas konstruotaj tiaj bazoj estas minacataj de revenĝa

frakasbato, flanke de la usonaj kontraŭuloj. La meksikia gazeto „Pueblo“ alvokas por kontraŭstari la ideon de Pentagono transformi Centran Amerikon en raketan bazon, „ideo, kiu hirtigas la harojn“, ĉar nun tre klara estas la provoka agado de la pendigindaj bruligantoj de milito (la spion-aviadiloj U-2, RB-47, militbazoj).

La tuta honesta homaro subtenas la kuban popolon, batalantan kontraŭ sia malamiko — la usonaj monopoloj kaj generaloj.

Dipl. inĝ. **Verŝinin Aleksej**,
prez. de Esperanto-Sekcio ĉe Odessa, Domo de Scienculoj

Usona militbazo en Quantanamo



aliĝu en bazo de paca trafiko por plifortigi pacan kunvivadon.

AMIKECO

AI I. V. SERGEJEV

Amiko, se paroli pri la tombo,
Ni trafos ĝin eĉ sen atoma bombo ...
Sed en la vivo homa, ne fantoma,
Nin feliĉigu paca fort' atoma
Kaj levu alten per flugiloj mitaj
Kaj ĉiujn revojn faru plenumitaj.

Amiko, se paroli pri la timo,
Gi faras homon sklavo kaj viktimo.
Do ĉiam estu nia vera eco

Modesta, tamen firma heroeco,
Por ke neniam venku nin sufero
La koro prenu ion de la fero.

Amiko, se paroli pri la verso,
Ĝi sonu vaste en la universo,
Kaj ies vivon en la fora foro
Intime kara faru al la koro,
En ĉiujn homojn ĉiuj ondoj, spikoj
Flustrante nomu kiel nin: „Amikoj“ ...

K. Gusev

LA BRUNA PESTO DAURE EMBUSKAS

Pasis nur 15 jaroj de post la venko de la unuigitaj nacioj super la hitlera Germanio. Sed la bruna pesto denove estas epidemia. Denove ekshitleranoj estras en la Bonn'a ŝtataparato kaj en Bundeswehr (okcident-germana revenĝa armeo).

Ĉu tio estas nur nudaj, senfaktaj asertoj? Jen la faktoj:

1. En la Bonn-registara aparato troviĝas 181.202 ekshitleranoj-oficistoj, 9.000 juĝistoj kaj prokuroroj estas eksnaziistoj, 1/3 de la diplomataro altranga translokiĝis el la hitlerministerio por eksterlandaj aferoj. 11 urbpolicestroj estas eks-SS-anoj.
2. Ĉe la kapo de Bundeswehr troviĝas la militkrimuloj Strauss, Hoizinger, Ruge, Kamhuber, Rettiger.
3. En la Bonn-respubliko estas repermesitaj NSDAP (Hitler-partio), profaŝismaj organizajoj: Germana imperia partio, Ŝtahlhelm, Kifhoizerbund, diversaj Soldatbund'oj ktp. Denove en Okcidentgermanio estas sonigataj lozungoj pri la rasa „supereco“ de la arjoj, pri „la granda Germanio“, pri revizio de la polaj kaj ĉeĥaj ŝtatlimoj, „Drang nach Osten“ (bato kontraŭ Oriento).
4. 17 grandaj germanaj monopoloj posedas kaj kontrolas 80 % de la tuta germana akcia kapitalo. Kiuj monopoloj ? Tiuj, kiuj de la Internacia Juĝantaro en Nürnberg post la dua mondmilito estis deklaritaj kiel militkrimuloj: Tyssen, Flick, Mannesmann, Kleckner, Merton k. a. La monopoloj estas nun kunligitaj kun la usonaj monopoloj Rockefeller, Mellin, Dupon k. a.
5. Adenauer en sia konversacio kun la Roma papo Johano XXIII. permesis al si diri: „Mi kredas, ke Dio destinis al la germana popolo specialan rolon ... servi kiel barilo por Okcidento kontraŭ la fortega influo de Oriento.“

Ĉu tiuj ĉi faktoj ne sufiĉas?

La Brita ĵurnalo „Daily Mirror“ skribis: „En nuna tempo en okcidenta Germanio okazas malrapida kaj konscia venenado de la germana junularo per la doktrino de la eksnaziisma reĝimo... La Bonn'a Germanio iras absolute la saman vojon kiel tiam (dum la tempo de Hitler).

Kaj alia Brita ĵurnalo „Daily Herald“: „Tro multaj viktimoj estis oferdonitaj dum la kontraŭfaŝisma milito. Tial ni ne deziras, ke tio revenu.“

La ne ĝisfine neniigitaj dum la dua mondmilito nazikrimuloj, nunaj kunhelpantoj de Adenauer, eĉ ekkuraĝis minaci al Sovet-Unio. Al tio la ĉefministro sovetia, Nikita Ĥruŝĉov, diris en sia raporto al la sesio de la Supera Soveto:

„Kun plena certeco necesas deklari, ke se en okcidenta Germanio la potencon akirus la senbride arbitreagantaj faŝistoj, kiuj nun estas allasitaj estradi super la militfortoj de NATO, kaj se tiu reptilaĉo ekintencus elrampi ekster siajn ŝtatlimojn, ĝi ne nur ne sukcesus ĝisrampi ĝis Moskvo kaj Stalingrado, sed estos dispremata sur sia propra teritorio.“

Prave estas dirite: Kiuj havas orelojn — aŭdu! Kiuj havas okulojn — vidu! Homoj! Estu atentemaj al la faŝisma baraktado en okcidenta Germanio! Ne lasu al la bruna pesto disvastiĝi en la mondo. Ne forgesu pri Oradur, Osvencim, Mauthausen, Buchenwald, Lidice!

Dipl. inĝ. **Verŝinin Aleksej**, prez. de Esp.-sekcio ĉe Odessa, Domo de Scienculoj.

SEN LINGVOSCIO EN FREMDAJ URBOJ

Aperis ofte raportoj pri okazintaĵoj, kiam montriĝis, ke ne estas facile interkompreniĝi eksterlande sen la necesa lingvoscio. La hungara pionir-revuo **Tabortiiz** konigas vojaĝraporton de sia kunlaboranto pri ties vizito en Moskvo. Jen parto el ĝi:

„Mi neniam ŝatis, se en nekonata loko min akompanus interpertisto aŭ la gastiganta dommastro. Mi ŝatis lukti kun la malfacilaĵoj de la fremda lingvo, kun la nekonataj kutimoj. Dum la duona tempo oni povas tiel la duoblan sperti... Sed ne sukcesis ... Tamen subite la tuta urbo iĝis mia interpretisto. Kiam oni eksciis, ke mi estas eksterlandano, nekonataj homoj aliĝis al mi, ili akompanis min, klarigadis. Ekzemple en bakaĵvendejo la vendistoj kaj la aĉetantoj kune interkonsiliĝante post longa diskuto decidis, kion mi deziras aĉeti. Sed tion mi tamen ne volis aĉeti.

P. B., Budapeŝto.

KOMPAROJ

En la komedio **Ondine** de Giraudoux, kavaliro prezentas sin per jenaj vortoj: „Mi ne estas malica, mi ne volas malbonon al iu ajn homo. Sed mi amas la militon!“

Tiuj ĉi memkonfesoj kondukas miajn pensojn al alia kavaliro. Li estas ĉefsekretario de la Atlantika pakto kaj lia nomo estas Paul-Henri Spaak. En New York li, okaze de la UN-debato pri malarmado, konkludis — kiel kutime — ke la NATO-landoj devas esti kunligitaj pli forte kaj ke ili devas pligrandigi sian militistan forton.

.Spaak estas kristano kaj kiel tia li ja devus ami sian proksimumon kiel sin mem. Ĉu li estas viktimo de sintrompo ? Ĉar se okazus milito ankaŭ la NATO-bonzoj perdus ĉion, kion ili alte aprezas: riĉaĵojn, privilegiojn, potencon kaj, antaŭ ĉio, siajn proprajn vivojn.

Ekzistas abismo inter tiuj, kiuj pledas por daŭra vetarmado kaj tiuj, kiuj volas plenan malarmadon. Sekve, en la batalo por la paco ne povas ekzisti neŭtraleco, same kiel ne povas ekzisti „paca kunekzistado” en kapitalismaj landoj inter malsamaj klasoj.

C. Message, laboristo, Belgio

RECENZOJ

LINGVO KAJ VIVO — Esperantologiaj eseoj de Gaston VVARINGHIEN, 452 paĝa libro, 16x22 cm, eldonita de **Stafeto**. Prezo: broŝurita 3,40; tolbindita 4 usonaj dolaroj, plus sendokosto.

Ĉu vi amas nian lingvon? Ĉu vi volas esti armitaj por refuti la argumentojn de tiuj, kiuj ĝin kritikas, ĉar ili estas ne aŭ malbone informitaj, aŭ volas altrudi alian lingvan projekton? Ĉu vi volas loki objektive Esperanton inter ĉiujn nun ekzistantaj aŭ jam forpasintaj, fiaskantaj, ĝiaj pretenditaj anstataŭantoj ? Ĉu sufiĉe interesas vin nia ilo por deziri pli funde ekscii ĝian internan meĥanismon, la kialon aŭ originon de tia aŭ alia afikso; penetri vin de ĝia riĉeco? Ĉu vi ŝatus senti ĝin vivi intense en via menso pere de unu el ĝiaj plej bonaj propagandistoj, kiu mem pravas per sia ekzemplo, kiel oni povas, potence kaj efike, ĝin utiligi?

Tiam nepre, vi devas havigi al vi tiun libron. Ĉar vi ekscios ankaŭ multon alian. Vi tie trovos analizojn kaj citaĵojn pri la primitivaj formoj de Esperanto, kiuj montros al vi kun kioma peno nia Majstro devis konfronti por liveri al ni, al homaro tuta, tiel bone ellaboritan interkomprenilon. Tra

la diversaj kaj profundaj konoj de la verkisto, vi penetros en pripensadojn kiuj plilarĝigas la mondkonceptojn. Vi eniros en sekretojn de gramatiko, kiu ne estas tiel simpla kaj facila kiel la unuaj kursoj kredigis al ni. Vi banos vin iomete en la historio de nia movado. Se la teksto kelkfoje trapasas detalojn iom tro teknikajn por nefakuloj, vi distros vin pere de Interludoj en kiuj humoro kaj spriteco kunludas kun scioj multon alportantaj. Vi pli konvinkiĝos kiom nia lingvo spitis multajn barojn kaj pruvis sin tiel vivanta, teorie kaj praktike, ke neniu rajtas dubi pri ĝia fina venko. Kaj se vi estimas vin sufiĉe eminenta por ne bezoni tiajn trafajn argumentojn, restos al vi la plezuro esti leginta la stilon de G. W. al kiu neniu esperantisto, laŭ mi, povas resti indiferenta.

R. ETIENNE, Francio

HELPU LA ATOMMALSANULOJN EN JAPANIO

La prezidanto de la japana MEM-sekcio, k-do J. Ĉunoŝin, petas ĉiujn, kiuj havas eblecon, kolekti monon por helpi la viktimojn de la radioaktiveco, kaŭzita de la atombomboj super Japanio. La oficiala helpo al ili estas nesufiĉa.

La mondonacojn bonvolu sendi al k-do Jui Ĉunoŝin, NAGOJA, Nakaku, Sengaĉo 1-28, Japanio. Kiu volas vendi insignojn de grupo, kiu simboligas la esperon de la atommalsanuloj, sendu siajn mendojn al la indikita adreso.

Broŝuro pri la sudtirola problemo

En propra eldonejo s-ano Hugo Steiner, Aŭstrio, eldonis dokumentaron titolitan **Sudtirolo en la jaro 1960**, por ke „ĉiu prudenta homo povu mem fari al si bildon pri la fakta situacio pri la sudtirola demando“.

S-ano Steiner informas, ke li ne estas politikisto kaj ke lia broŝuro ne estas politika diligentlaboro. Sed li vekas per ĝi la demandon: Kial Italujo rifuzas doni aŭtonomion al Sudtirolo? Kaj li faras tion en la internacia lingvo tial, „ĉar la esperantistoj laboras en la tuta mondo por homrajto kaj paco“. Sendube la sudtirola demando estas grava ne nur por Aŭstrio kaj Italujo, sed ankaŭ por Eŭropo entute. Kaj la broŝuro donas per multaj citaĵoj eblecon studi tiun aferon, kiu cetere denove aktualiĝis, ĉar ĝi en septembro estis pritraktita ĉe la Plenkunsido de la Unuiĝintaj Nacioj.

La broŝuro estas mendebla ĉe la eldonejo Hugo Steiner, Internacia Esperanto-Muzeo, Wien I, Hofburg, Aŭstrio. La prezo estas 6 int. resp. kuponoj.

G.

Ĵus aperis ...

nova, kvara eldono de „**KANTOJ POR LA PACO**“, poemaro originale verkita en esperanto de C a n-ko Murgin.

La nova eldono kvara estas kompletigita per pluraj novaj poemoj kaj enhavas ankaŭ parton de tradukajoj de tiel famaj poetoj kiel V a p c a r o v , Smirnenski, S u r k o v k a.

La poemaro estas 40-paĝa kun trikolora kovrilo kaj presita sur bonkvalita papero.

La novan eldonon prizorgis la sveda MEM-sek-cio, kiu ankaŭ vendas ĝin. Ni rekomendas al ĉiuj MEM-anoj kaj aliaj pacamikoj kaj amikoj de poemoj, plej baldaŭ sendi al ni mendojn.

La modera prezo 1,60 svedaj kr. aŭ 4 Int. R. K. devas ebligi por ĉiu havigi al si ekzempleron de la velorega verko de s-ano Murgin.

Mendu ĉe jena adreso: Sveda M. E. M.-sekcio. Karl Kvist, Box 109 a, **DEJE**, Svedio.

Prof. Delfi Dalmau, Barcelona, eldonis **Esperantan resumon de Stenologio kaj Stenografio**. En ĝi li prezentas sian solvon pri la problemo de internacia stenografio, kiu laŭ lia multjara sperto pri tiu problemo devas esti korelativa al fonetiko kaj stenoj al literoj. Per facilaj stenoj -kaj logikaj mallongigoj oni devas ebligi plejan rapidecon kaj klaran stenografion.

La 15-paĝa broŝuro meritas esti studata de ĉiu esperantista stenografo, kiu el ĝi povas ricevi plurajn interesajn ekzemplojn de praktika aplikado. Ĝi kostas nur 2 resp.-kuponojn kaj estas mendebla ĉe Cursos Bel-post-Tecnopost, Lauria, 98, Barcelona, Hispanio.

G.

KORESPONDI DEZIRAS

Bulgario. Mi estas nova esperantistino kaj multe estimas amikecon. Mi ŝatas psikologiajn temojn kaj serĉas korespondanton en Svedio. Mia adreso: Bulgario — **Sofio** — Gornobanski pat, bulv. „Petko Napetov" 36, Institut ohrana truda. S-anino **Ekaterina Narova**.

K-do **Dimitar Papazov** (17-jara), **Nova Zagora**, str. „Car Osvoboditel" N-ro 33, dez. koresp. pri div. temoj kun ges-anoj el la tuta mondo.

Geesperantistoj ĉe granda uzino fondis Esperantan Societon kaj deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri paco kaj amikeco. Nia adreso: Esp.-Societo ĉe uzino „G. Dimitrov", Prez. H. Hristov, **Ruse**, Bulgario.

Hungario. D-ro Ladislav S z a l ó k y, **Budapest, XII**. Kis altáb. 43, Hungario, dez. kor. kun okulkuracistoj. Kor. esperante, itale, germane.

Rumanio. Aleksandro Tauŝĉuk (20-jara), str. Ghe-nadie Petreskŭ 43, **Bucuresti 23**, Rumanio, dez. interŝ. poŝtmarkojn, bildkartojn, esperantogazetojn k. a. kun Okcidenteŭropo, Azio, Afriko kaj Aŭstralio. Nepre respondos ĉiujn.

GDR. K-do **Aŭg. Heil** (55-jara), BORNA/Leipzig, Aug. Bebelstr. 7, GDR, deziras korespondi kun k-doĵ en socialistaj landoj pri politikaj kaj ekonomiaj temoj.

Svedio. Pacamikoj, esperantistoj en ĉiuj landoj! Ni afable petas vin, skribi leterojn kaj kartojn amase al nia „Letervespero“, kiu okazos **la 14-an de jaunaro 1961**. Ni garantias respondojn. Sendu la leterojn kaj kartojn al: S-ano **Äke Larsson**, Flora, **Kungälv**, Svedio kaj al: **Fraŭlino Gunnel Emanuelsson**, Radmansparken 7, **Kungälv**, Svedio.

Ĉeĥoslovakio. Esperanto-rondeto-kroužek OB, Heřmanův Městec, deziras ricevi propagandan materialon kaj salutojn. Interŝanĝe vi ricevos dankleterojn, IPjn, MPjn, UTKjn, GMjn, prospektojn kaj aliajn interesaĵojn laŭ Via deziro. Respondo garantiata. La anonco ĉiam validas!

K-do **Jos. Vild, Rokycany 116/11**, Ĉeĥoslovakio, dez. korespondi, interŝ. ŝtampitajn pm. kaj alometetikedojn.

Stanislav Bartovic, ul. Ĉs. armady 12, **Pieštany**, Ĉeĥoslovakio, dez. interŝ. spertojn kaj gazetojn pri konstruado de malsanuleĵaj ekipaĵoj.

Vlad. A l i n ĉ e, ĝardenisto, **Hodslavice 80**, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. pri floroj eĉ diversaj temoj kaj interŝ. semojn kaj katalogojn pri semoj.

Jaroslav P e l c m a n, Kostincova ul. 42, **Plzeň**, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. pri muldado kaj metalurgio, precipe kun kamaradoj el USSR.

Josef Ed. Ambroz, Špačkova 3, **Brno-Židenice**, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. pri vivo de ftizuloj en laborejoj kaj sanatorejoj, pri sociala prizorgado kaj pri defendo kontraŭ tabakfumado. Interŝ. ruĝ-krucajn, sanitistajn kaj esperantistajn p. m., glumarkojn, almet-etiketojn kaj insignojn.

Antonio **Kladiva**, Hodslavice 87, okr. Novy Jičín, Ĉeĥoslovakio, dez. int. poŝtkartojn kun la tuta

mondo.

Bv. noti: MEM-peranto en Jugoslavio Andreja Raškovič, M. Tita 75/II-9, **Kragujevac**.

MEM-sekretariejo:

Prezidanto: Canko **Murgin**, str. Iskar 46, **Sofio**, Bulgario.

Ĉefsekretario: A. **Balague**, Traiseng. 26, **St. Pölten**, Aŭstrio.

Centra redaktoro: G. **Holmkvist**, Rönnelholmsvägen 55, tr. 2, IV, **Malmö V**, Svedio.

PACO aperas ĉiumonate en malsamaj landoj. Tiu ĉi numero estas eldonata de la MEM-sekcio ĉe Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato (Osvětový ústav, Praha 2, Blanická 4). Redaktoro: Josef Ed. **Ambrož**, Brno-Židenice, Špačkova 3. Redakta komitato: D-ro Gorazd **Hofer**, Vratislav **Kučera**, Viera **Malárová**. Lingva konsultanto: Josef **Vondroušek**.

Administracio: Esperantista rondo de Závodní klub ROH Závodů V. I. Lenina, Plzeň, Kopeckého sady 13.

Jarkotizo: 20 Kčs — Presis: **Okcidentbohema presejo, nacia entrepreno en PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio.**